

7-8

1983

MONATA REVUO
FONDITA
EN JARO 1903

OFICIALA ORGANO
DE I.K.U.E.
INTERNACIA
KATOLIKA UNUIĜO
ESPERANTISTA



**ESPERO
KATOLIKA**

INTERNACIA KATOLIKA UNUIGO
ESPERANTISTA*Honora Prezidanto:*

Sac. Alfons Beckers
Rozenlaan, 5
B - 3950 Beringen (Belgio)

Prezidanto:

Sac. Duilio Magnani
viale C. Zavagli, 73
I - 47037 Rimini/Forlì, Italio

Vicprezidantoj:

Sac. Roger Degrelle, B.P. 23, F-54510 Tomblaine,
Francio;
Sac. Józef Gotter, Trzebnice 113, PL-59.312
Chocianowice, Pollando

Sekretario:

Antonio De Salvo

Kasisto:

Sac. Felice Ruaro, I-37010 Costermano (Verona),
Italio

Estraro:

A. Beckers, A. Ciccanti, R. Degrelle, A. De Salvo,
F. Gruič, L. Köbor, J. Kondor, J. Korytkowski, F.
Ruaro, S. Szénási

Plenumkomitato:

Aŭstrio: Mudrak; *Belgio:* Poterucha; *Ĉeĥoslovakio:*
Dlugi, Sváček; *Francio:* Bourdon; *F. R. Germanio:*
Eichkorn; *Hispanio:* Casanoves; *Hungario:* Kollár;
Italio: Cadei, Pisoni; *Jugoslavio:* vakas; *Nederlan-*
do: Smits; *Pollando:* Forycki, Kos; *Svislando:* Bom-
mer; *Usono:* Laughery

Centra Oficejo:

Via Berni, 9
I - 00185 Roma (Italio)
tel. (06) 7588388
poŝta konto 23290000
Direktoro: Antonio De Salvo

Oficiala organo:

Espero Katolika

Kotizo:

22 svisaj frankoj aŭ egalvaloro

Registriĝo ĉe la Tribunalo de Romo

(Registrazione presso il Tribunale di Roma)
n. 17138, 11-2-1978

Respondeca Direktoro (Direttore Responsabile):

Antonio De Salvo
C.P. 4017 Appio, I-00100 Roma RM, Italio
tel. (06) 7810782 (vespere)

Presejo (Tipografia):

ROTATORI
Viale Manzoni, 22/b - Roma

P. Korytkowski, Kard. Ratzinger kaj P. Magnani en
Varsovio (foto Dąbrowski)

ENHAVO

- 107 Kiam ajn la Sinjoro nin vokas...
(B. C.)
- 108 La plej mirinda alianco
(B. Cadei)
- 110 Preĝo de ia homoj senvoĉaj
- 112 Kvindek jarojn post la aperoj de la
Dipatrino en Beauraing kaj Banneux
(L. Muller)
- 114 Legantoj skribas
- 115 Raporto el la Misiejo (J. Sadowski)
- 116 Vojaĝo al Pollando (D. Magnani)
- 117 El la profund' mi krias al Vi!
(A. Horváth)
- 118 Iom pri « Internacio Katolika »:
kiam I.K.U.E. riskis malaperon...
(C. Sarandrea)
- 122 Plendoj de Kristo
(J. Cserbáti)
- 123 Unue paciĝu kun via frato (O. M.)
- 124 Libroservo
- Periodico culturale - gruppo III - pubbl. inf. 70%
lire 700.
- Kultura periodaĵo - monata - malpli ol 70% da
reklamo - 700 liroj.

KIAM AJN LA SINJORO NIN VOKAS...

Evangelia medito

Kiam ajn la Sinjoro nin vokas, ni ne fermu la orelojn (kp Ps 95, 7-8).
Simono kaj Andreo lasis la retojn (Mt 4, 18-20).

La filoj de Zebedeo forlasis la patron kaj la boaton (Mt 4, 21-22).

Natanaelo, senruza izraelido, sidis sola sub arbo, kaj venis kaj vidis (Jo 1, 46-47).

Mateo forlasis la impostejon, kie li kolektaĉis monon (Mt 9, 9).

Blindulo, almozetanta en Jeriko, ricevis vidpovon, kaj sekvis la Sinjoron (Mt 20, 34).

Samarianino lasis la kruĉon ĉe la puto, kaj iris anonci pri Jesuo (Jo 4, 28-29).

La riĉa Zakeo, kiu gvatis la Sinjoron de sur arbo, Lin akceptis kaj vivoŝanĝis (Lk 19, 2-8).

Nikodemo venis nokte al Jesuo, kaj fariĝis lia disĉiplo (Jo 3, 2; 19, 39).

Adultino, surprize kaptita ĉe adulto, ne estis kondamnita (Jo 8, 11).

Fine, rabisto sur kruco turniĝis al Jesuo, kaj ricevis eternan vivon (Lk 23, 42-43).

Ĉar la Sinjoro staras ĉe la pordo kaj frapetas: se iu malfermas, Li eniros kaj donos sian intimecon poreterne (kp Apok 3, 20).

B. C.



Jacopo Tintoretto: Kristo kaj la adultulino
(Romo, Nacia Galerio pri Antikva Arto)

LA PLEJ MIRINDA ALIANCO

La inundego (Gen 6 - 9): resumo

En nia unua artikolo (EK 6/83) ni vidis, ke la ligo de la prahomo kun Dio rompiĝis pro la malobeo de Adamo kaj Eva; sed en la momento mem de ilia forpelo, Dio promesis la venkon de la idaro de la virino super la serpento-diablo (Gen 3, 15).

La sesa ĉapitro de Genezo parolas pri plua multobligo de la pekado sur la tero, tiel ke Dio pentis, ke li kreis la homaron, kaj decidis ĝin ekstermi. Sed ne ĉiuj homoj estis malbonaj; tial Dio ordonis al la justa Noaĥ konstrui arkeon, tio estas ŝipaĵon en formo de kestego, por savi lian familion kaj la bestojn. Kiam ĉio estis preta, kaj la arkeo plenigita per ok homoj kaj multegaj besto-paroj, inundego (aŭ diluvo) kovris la tutan teron dum 40 tagoj. Poste la pluvego ĉesis, kaj la akvonivelo komencis malaltiĝi ĝis la kolombo, elsendita esplori, revenis kun branĉeto de olivarbo. Tiam Noaĥ eliris de la arkeo, konstruis altaron, kaj faris bruloferon al Dio, kiu ĝin ŝatakceptis, kaj denove donis al la homo reg-povon super la tuta kreaĵaro, kaj aperigis la ĉielarkon kiel signon de interligo inter Dio kaj la homaro.

Maniero de rakontado

Ĉu la diluvo vere kovris la tutan teron? Kial Dio, kiu estas senfina scio kaj prudento, *pentis*, ke li kreis la homon? Ankoraŭ ĉi tiu parto de la Biblio estas papolrakonto, devenanta el plurjarcenta buŝparola tradicio.

Eble ĉe la origino estas memoro pri katastrofaj inundoj, oftaj en Mezopotamio: tion konjektigas, interalie, la fakto ke ĉe la mezopotamiaj kulturoj estas similaj mitoj pri la diluvo. Eble, do, la rakonto de la malmultaj transvivintoj de iu katastrofo pligrandigis la teruran eventon ĝis universalaj geografiaj kaj homaraj dimensioj.

Pri la *pentito* de Dio: la Biblio, ĉefe en siaj plej antikvaj partoj, prezentas Dion laŭ homa maniero: li havas homan formon (antropomorfismo: Dio kun manoj, okuloj, buŝo...) kaj homajn pasiojn (antropopatismo: Dio koleras, pentas, kortuŝiĝas). Aliflanke, la Biblio plurloke substrekas la superecon kaj transcendon de Dio, lian senmezurecon kaj lian nekompareblon kun la homo.

Religia mesaĝo

Per la rakonto de la inundego la Biblio instruas, ke Dio ne toleras la pekadon: « La Eternulo vidis, ke granda estas la malboneco de la homoj sur la tero, kaj ke ĉiuj pensoj kaj intencoj de iliaj koroj estas nur malbono en ĉiu tempo; tiam la Eternulo pentis, ke li kreis la homon sur la tero, kaj li afliktiĝis en sia koro. Kaj la Eternulo diris: Mi ekstermos de sur la tero la homon, kiun mi kreis » (Gen 6, 5-7).

Sed ne ĉiuj homoj estas malbonaj: « Sed Noaĥ akiris plaĉon en la okuloj de la Eternulo » (Gen 6, 8). La pekado retroirigas la mondo al la praa haoso: « En tiu tago disfendiĝis ĉiuj fontoj de la granda abismo, kaj la aper-turoj de la ĉielo malfermiĝis » (Gen 7, 11).

Post la diluvo okazas kvazaŭ nova kreado: denove Dio donas al la homo regpovon super la mondo (Gen 9, 2-3). Krome li starigas novan aliancon kun la homaro: « Mian arkon mi metas en la nubon, kaj ĝi estu signo de la interligo inter mi kaj la tero. Kaj kiam mi venigos nubon super la teron, mon-triĝos la arko en la nubo; kaj mi rememoros mian interligon, kiu ekzistas inter mi kaj vi kaj ĉiu viva ekzistaĵo el ĉiu karno, kaj la akvo ne fariĝos plu diluvo, por pereigi ĉiun karnon » (Gen 9, 13-15).

La ĉielarko fariĝas signo de la neniam ĉesonta amo de Dio, malgraŭ ĉiaj pekoj.

Kun B. Marconcini ni resumas la religian mesaĝon de la unua parto de Genezo jene: « Gen 1-11 malkaŝas al la homo — kaj ĝi estas la plej grava mesaĝo — lian staton de elaçetito. Dum la homo ne perceptos sian bezonon de savo kaj sian nekapablon ĝin atingi memsole, vana estos ĉia alvoko, ke la armiloj ĉesu mortigi, ke venu iu, kiu disrompu panon al mal-sataj infanoj, ke viŝiĝu la larmoj de multaj patrinoj, ke reaperu rideto sur la lipoj de seniluziaj gejunuloj. La fakto de origina peko, kiu igas la mondon regno de pekado, aŭ — kiel oni hodiaŭ preferas diri — la mondon malkapabla je amo, enkrizigas la memsufiçecon de la homo, lin instigas agnoski kiel Dian donacon ĉion, kion li trovas en si kaj ĉirkaŭ si, lin metas antaŭ la respondecon ne turni kontraŭ la fratojn la donacojn de Dio. Percepti sin kiel elaçetitojn, eble hodiaŭ estas la ununura rimedo supervenki la malsekurecon, seniluzion, frustracion, angoron. Gen 1-11, entute, instruas, ke nur sincera kaj aŭtentika religia vivo de amo al la Sinjoro evitigas multajn malbonojn de nia epoko ».

Pro la neĉesonta amo de Dio, la homo venkos super la malbono.

Battista Cadei

● Polino 43-jara deziras korespondi tutmonde: **Agnieszka Szmytkowska**, ul. Bulonska 8 B/10, PL-80.287 Gdańsk, Pollando.

● Witold Piotrowski, ul. R. Kocha 1 A, PL-51.122 Wrocław, Pollando, 15-jara lernanto, deziras korespondi kun la tuta mondo, interesiĝas pri bicikla turismo, kolektas poŝtmarkojn, bildkartojn kaj diapozitivojn.

● Bolesław Weremko, ul. Czereśniowa 12 m 81, PL-21.040 Świdnik k/Lublina, Pollando, deziras korespondi. Li interesiĝas pri Esperanto, religio katolika, poŝtmarkoj.

PREGO DE LA HOMOJ SENVOĈAJ

Sinjoro, ni estas la mutaj sur la tero;
neniam ni rajtis aŭ kuraĝis paroli;
ĉiam ni obeis alies parolon.
Ĉu vere, Sinjoro nia parolo
estos senutila kaj senfrukta?
Sinjoro, mi sentas la vivon min surpaŝi
kiel daŭra perforto.
Ne estas por mi loko inter tiuj,
kiuj parolas, decidas, diras ke ili vivas.
Mi estas senpova fronte al maljustaĵo,
kaj al ĝia faranto.
Mi vidas tiom da maljustaj aferoj.
Ĉi mian malforton ja konas potenculoj...
Mi konfesas, Sinjoro, ke mi timas paroli,
ke mi ne malhelpas, ke aliaj misuzu mian silenton
por pravigi la pretendojn de malmultaj.



Vjetnamaj rifuĝintoj savitaj en 1981
dum ili vagadis surmare serĉante novan patruon (Foto. Pres. Cons. Min.)



Patrinoj de argentinaj « malaperintoj »
proteste manifestacias en Buenos-Ajres (Foto Liverani - Mondoerre)

Kiam, Sinjoro, ni, la senvoĉaj, trovos la forton
kriegi la angoron, kiun de jarcentoj ni portas en la koro?
Mia preĝo, ho Kristo, nenio estas krom helpo-peto.
Helpu min malkovri mian dignon de homo
frustraciita de ĉiuj potencoj kaj institucioj,
eĉ de tiuj kiuj devus al mi anonci
vian mesaĝon de liberigo...
Mi devas trovi la kuraĝon batali
kun ĉiu kiu kredas ne nur en vi,
sed, kiel vi, en mi,
por aŭdigi la voĉon de ĉiuj kiuj daŭre mutas
pro timo, aŭ pro la perforto de kelkaj.
Jen mia parolo, post longa silento,
kaj mia nura ebla preĝo al vi,
kiu estas la Parolo de liberigo:
sufiĉe da timo, da rezignacio,
da maljusteco, kiu plenigis la mondon,
por tiom da povraj mutuloj kiel mi!

Juan Arias, trad. B.C.

KVINDEK JAROJN POST LA APEROJ DE LA DIPATRINO EN BEAURAING KAJ BANNEUX

(dua parto)

La signifo de kratego

Estu permesite al mi doni personan interpreton pri la signifo de la kratego en Beauraing. La Virgulino kun Ora Koro aperadas sub arbo, kies fruktoj kuracas la koron, kaj Ŝi deklaras: « *Mi konvertos la pekulojn* ». Bilde: mi kuracos ilian koron.

Laŭ mia scio, oni ĝis nun ne atentis en Beauraing pri la beroj, sed oni ja disdonis la foliojn de la dornarbo. Tiu fakto pensigis min pri Apokalipso 22, 2: « Meze de l' placo de l' civito kaj de la rivero ambaŭflanke kreskas ligno de Vivo, kaj *li* produktas dekdu fruktojn. Ĉiumonate *li* donas sian frukton, kaj ties folioj utilas por la sanigo de la Nacioj ».

Laŭ la franclingva ekumena traduko (T.O.B.), la ligno ne estas duobla vico da arboj starantaj ambaŭflanke de rivero, sed estas unika arbo: la ligno de vivo el la Genezo. Kaj la greka teksto, laŭ du manuskriptoj, pritraktas tiun lignon kiel vivantan personon: « *xylon didous* », en maskla formo anstataŭ neŭtra: tial mi tradukis « kaj li donas ».

Tiu personigita ligno, sub kies branĉo staras la nova Eva, estas do la arbo de la Sankta Kruco, kompreneble ne la mortinta ligno, sed la vivanta kaj triumfanta Kristo.

La Arbo de la Kruco

La Dipatrino, trono de la Saĝeco, staras sub la arbo de la sciado de l' Bono kaj Malbono. Ateistoj volas libervole memdecidi, kio estas bona kaj kio malbona, kaj repuŝas ĉiun dian direktivon.

La saĝaj infanoj de Maria estas invitataj rilatigi ĉion al Dio. « *Ĉu vi amas mian Filon? Ĉu vi amas min? Oferu vin por mi!* ». Do, nia konduto estu la sanktiĝo pere de la partopreno en la sinofero de Jesuo sur la kruco. Tion elvokas la franca esprimo: « *Sacrifiez-vous...* ». Komprenu: « *Oferu vin per sanktiga ofero* ».

Apokalipso identigas la du Lignojn de Genezo: la Lignon de Saĝeco kaj la Lignon de Vivo. Ambaŭ troviĝas en la Arbo de la Kruco.

En Genezo la pragepatroj rabis la frukton de l' Saĝeco, t. e. de la sciado de Bono kaj Malbono. Laŭ Filipanoj 2, 6-9, Kristo ne konsideris la egalecon kun Dio kiel rabajon. Rabajo estas aĵo ŝtelenda aŭ nepre konservenda malgraŭ ĝia duba deveno.

La altega, riĉega Filo de Dio malaltigis sin kaj fariĝis malriĉulo por honori anstataŭ ni la Patron per sia obeemo, kaj riĉiĝi nin per la oro de sia Amo (vidu Apokalipson 3, 18).

Laŭ Apokalipso, la frukto de la Ligno de Vivo ne akiriĝas per rabo: male, la Krucumito persone donas ĝin. Kondiĉo estas, ke oni purigu la vestaĵojn en la sango de la Ŝafido (Ap 7, 14). La kruco fariĝas, tiel, Ligno de

la Sciado de Bono kaj Malbono, per la rekono de propraj kulpoj kiel ofendoj al Dio, forviŝitaj per la bapto.

La Apero en Banneux

Aludon al la bapto ni retrovas en la Fonto de Benneux.

Pri Banneux mi rakontos pli mallonge, ĉar ekzistas en Esperanto faldfolio de Pastro Alfons Beckers, kaj libreto de Patro Modesto Carolfi.

Vizitinte Beauraing, Rektoro Jamin el Banneux preĝis: « Se Vi vere tie aperis, konvertu pekulon el mia paroĥo ».

La 17-an de januaro 1933 aperis la « Virgulino de la Malriĉuloj » al knabino, bedaŭrinde forlasinta la katekismon, kiu devis prepari ŝin al la solena kredkonfeso.

La tipa apero en Banneux konsistis pli en agado ol en vortoj: la « Patrino de la Savanto, Patrino de Dio » altiris kvarfoje la infanon al akvofonto. « *Sovu viajn manojn en la akvon* ». Mariette Beco obeis. « *Tiu fonto estas rezervita por mi... Por ĉiuj Nacioj... por mildigi la suferon...* ». Tiamaniere la Virgulino montris sian rolon konduki la pekulojn al Kristo, fonto de l' Savo.

Kiel unua Mariette konvertis sin, reirante al katekismo, kaj petante unuafoje la konfesprenon de siaj pekoj kaj la sanktan komunio.

Mi kredos en vi...

Kiam la Rektoro petigis signon, la Dipatrino respondis: « *Kredu en mi. Mi kredos en vi...* ».

La lasta apero okazis 2.3.1933 je la 19-a horo. Rektoro Jamin ne sciis, ke en 1961 li mortos ĝuste en tiu tago kaj horo.

Li mem rakontis, kiel li devis konvertiĝi el duonracionalismo rilate al la Dipatrino.

Oni demandis sin, kion signifas: « *Mi kredos en vi* ». Sed tiu malsana sacerdoto, kiu eĉ ne havis 300 paroĥanojn, bezonis, ke oni kredu en li. Kiel li povus plenumi la taskon agnoskigi kaj disvastigi tiun mesaĝon al ĉiuj nacioj? La ĉiela helpo ne mankis. Jam antaŭ la mondmilito la Internacia Preĝunuigo nombris pli ol du milionojn da anoj. Parolante pri « *ĉiuj Nacioj* » du semajnojn antaŭ la triumfo de la Nacisocialisma Partio en Germanujo, la Dipatrino montris la ĝustan vojon, kvazaŭ Ŝi dirus: « *Ĉiuj Nacioj estas miaj infanoj. Neniu el ili metu sin super la aliaj* ». Kaj fakte, la unuaj malsanuloj, kiuj okupis la freŝkonstruitan Gastejon por Malsanuloj en 1940, estis vunditaj germanaj militistoj. Ĝuste ili, post la katastrofo de 1945, organizis la unuajn germanajn pilgrimadojn al la Virgulino de la Malriĉuloj.

Konkludo

1933 estis la Jubilea Jaro de la Elaĉeto per la morto de Kristo sur l'arbo de la Kruco. Aperante 33 fojojn en Beauraing, Maria preparis tiun jaron de repaciĝo de la Homaro kun Dio. Sub la Arbo de la Vivo Ŝi staris kiel nova Eva sub la Kruco. En Banneux Ŝi kondukis la vidantaron al la Fonto de la

Vivo, rolante kiel Perantino de la Gracoj. Per sia allogo Ŝi invitas nin kiel la Fianĉino de Apokalipso, dirante kun la Spirito: « Venu! ».

Ni respondu konfide: « Jes, venu, Sinjoro Jesuo! Amen ».

Sac. Louis Muller, Belgio

Pri Banneux mendu la esperantlingvajn faldfoliojn de A. Beckers ĉe P. Louis Muller, rue François Lefebvre 207, B-4420 Liège, Belgio.

Naciingvaj tekstoj (france, nederlande, germane, angle, pole, ukraine, ĉeĥe, kroate, itale, hispane, portugale, koree kaj lingale) haveblaj kontraŭ po unu respondkupono.

Diapozitivoj kun esperantlingva kasedo kostas 1.700 belgain frankojn.

LEGANTOJ SKRIBAS

● Ĉar mi ĵus ĵkreis « Amazona Esperanto-Asocio »-n, mi bezonas helpon por Esperanto. Amazonio estas granda lando, riĉa je arbaregoj sed malmulte loĝata. Mi antaŭdankas pro ĉia materialo, kiun vi bonvolos sendi al mia adreso: Robinson Mattos, Est. da Ponta Negra 3060, San Jorge, BR-69000 Manaus, Amazonas, Brazilo.

● En sia tre valora artikolo pri la pioniro Pastro Dombrowski (v. EK 2/83), s-ro Bernald Golden kelklinie aludas pri Louis de Beaufront: « . . . ne tute dokumentita estas la vera biografio de tiu ombreca persono . . . ».

Estas ja necese precizigi, kiaj detaloj en la vivo de Louis de Beaufront mankas. Jen ili: la nomo de lia patro (verŝajne brito); kie li studis (ĉu en religia lernejo?); kie li trapasis ekzamenojn (ĉu duagradajn?); kiujn fremdajn lingvojn li sciis; ĉu li vere studis teologion; ĵkiamaniere li eksciis pri la ekzisto de Esperanto.

Ŝajne, ĉion alian ni ja precize scias.

Detala biografio pri li estas en la kolektoj de la Esperanto-Muzeo de Gray (Francio), kaj aliloke, kune kun la listo de liaj verkoj (kiu aperas ankaŭ en la « Bibliografio de Internacia Lingvo » de Stojan).

Roland Jossinet, Francio

● Bedaŭrinde, la ĉirkonstancoj ne permesos al mi veturi Italion, sed vere mi estos spirite kun vi ĉiuj. Estas konvinka esprimo de frateco, kiam la italaj katolikaj gesamideanoj helpas ankaŭ finance dum la restado de orienteŭropaj kunfratoj en Romo kaj Rimini. Mi tre volonte volus subteni vian strebon, ke la Sankta Patro dum la aŭdienco alparolu kelkajn vortojn en Esperanto.

Mi certigas vin kaj la IKUE-movadon pri mia konstantaj preĝoj. La donaco de la Sankta Spirito estu por ni konstanta fonto de fortoj por nia agado, por ke ni efike realigu la repaciĝon kun Dio, inter la homoj kaj popoloj. Dialogo kiel bazo de la repaciĝo en la mondo, bazo por la enkulturigo de kristanismo, fariĝu esencaj konsistaĵoj de nia laboro.

Mons. Karel Otčenašek, Ĉeĥoslovakio ()*

(*) Parto de letero *en Esperanto* sendita al la Prezidanto de IKUE (Magnani) de Mons. Otčenašek, Episkopo en Usti nad Labem (neagnoskata de la ĉeĥoslovaka Ŝtato).

RAPORTO EL LA MISIEJO

De Marolambo, kie mi loĝas, al la ĉefurbo Antanarivo, en birda flugo estas nur 150 kilometroj, sed mankas vojoj por veturi per aŭtomobilo, oni devus marŝi piede dum du tagoj al aŭtobuso aŭ trajno, do ni veturas ĉiam per aŭtomobilo ĝis Mahanoro (130 kilometroj dum du tagoj!), poste per aviadilo aŭ ankaŭ per aŭtomobilo (285 km) ĝis Tamatave, kaj fine ĉirkaŭ 300 km per aviadilo. Mia «ekskurso» al Antanarivo en majo 1982 kostis preskaŭ 200 usonajn dolarojn; sed ne ĉi tio estas la plej malfacila afero, plej malfacile estas trovi tempon kaj eblecon vojaĝi.

En decembro 1982 forlasis mian misiejon la lasta franca Montfortano, kaj nune ni, tri polaj Oblatoj, havas respondecon pri ĉirkaŭ 70 katolikaj komunajoj.

Mi ne kuraĝas peti pri Esperantaĵoj donace kaj senpage; ĉi tiuj libroj utilis nur por ke mi ne forgesu la lingvon. Mi neniam deziris (kaj deziras) labori *por* Esperanto: mi deziras *utiligi* Esperanton, misiadi pere de ĝi. Mi iĝis Esperantisto hazarde, poste mi estis tre kontenta pri ĉi tiu destino. Kvan-kam mi provis kelkfoje korespondi latine... mi ne sukcesis.

Sac. Jan Sadowski, Mission Catholique
RDM-513 Marolambo (Madagaskaro)



Polaj misistoj, Oblatoj de Maria Senmakula,
apud la preĝejo de Marolambo, Madagaskaro, 5.10.1982.
P. Jan Sadowski estas la lasta dekstre.

VOJAĜO AL POLLANDO

Kiel anoncite (v. EK 4-5/83, p. 75), de la 26-a de junio ĝis la 3-a de julio mi partoprenis en vojaĝo al Pollando de fidelula grupo de Rimini, sub la gvido de la Episkopo Mons. Giovanni Locatelli.

Multaj estis la geesperantistoj, kiuj bonvenigis nin en la varsovia flughaveno, kaj eĉ ne mankis florbukedo. Bedaŭrinde, ne estis al ni eble partopreni en la kunvenoj kaj en la spektakloj aranĝitaj por la italaj gastoj, ĉar la jam antaŭfiksita programo ne lasis al ni liberan tempon. Vespere mi kaj aliaj vespermanĝis gaste ĉe Mons. Miziołek, Helpa Episkopo de Varsovio.

27.6.83 ni vizitis La Ĉefepiskopon Mons. Dąbrowski, Sekretarion de la Pola Episkopara Konferenco, kaj la polan Primason, Kard. Glemp. Hazarde (ĉar li feriadis ĉe Mons. Dąbrowski) patro Korytkowski kaj mi sukcesis omaĝi ankaŭ al la germana Kard. Ratzinger, Estro de la Kongregcio pri Doktrino de la Kredo, kun kiu ni iomete parolis pri latino kaj Esperanto en la Eklezio.

De Varsovio al Niepokalanów kaj Ĉenstoŭovo mi veturis kune kun P. Zielonka, kun kiu mi povis pridiskuti kelkajn animzorgajn problemojn (oni ĵus renovigis al li la oficialan taskon animzorgi por la Esperantistoj de tuta Pollando), precipe en rilato kun la klopodoj por atingi rajtigon de la liturgiaj tekstoj kaj fine havi rajtigitan kaj belaspektan Meslibron.

En Ĉenstoŭovo atingis nin P. Gotter kaj S-ino Korytowska, kun kiuj mi pridiskutis kelkajn organizajn demandojn.

En Niepokalanów ĉiĉeronis por ni frato Kornel Kaczmarek (v. EK 1-2/82, p. 23). Post la vizito oni invitis nin (75 personojn!) trinki kafon



Sacerdotoj vizite ĉe Kard. Glemp
(oni rekonas, interalie, P. Korytkowski, Episk. Locatelli, P. Ciccanti, P. Magnani)

kaj manĝi kukojn. Ĉeestis ankaŭ S-ro Tomaszewski kaj S-ino Zapolska el Varsovio.

Aliaj Esperantistoj renkontis min en Oświęcim, en Krakovo, en Nowa Huta...

Mia Episkopo Mons. Locatelli estis tre kortuŝita pro la varma akcepto, kaj miregis pri la frateco de la Esperantistoj kaj pri la valora servo de Esperanto kiel interkomprenilo. Li publike subtenis Esperanton en la aviadilo, dum la revena vojaĝo.

(Laŭ rapidaj notoj de P. Duilio Magnani; pli detala raporto sekvos)

EL LA PROFUND' MI KRIAS AL VI !

Aŭskultu min Di' Sinjor':

Instruu kiel mi devas larmi
en nemerita ĝoj', ĝoji en merita plor'
Donu forton paligi mian brilon orgojlan,
saĝe briligigi mian humilon sentonan.

Instruu kiel devas klini min al feblul',
alfronti rekte al senbrida potencul'.

Donu forton la korpon supereme regi,
humile al la Spirito min disponigi.

Instruu milde respondi insultan voĉon,
kun frida rideto rifuzi falsan gloron.

Instruu elani Vin retrovante,
abrupte ekhalti vojerarante.

Ne plenumu ĉiam kion mi deziregas,
instruu esti kuraĝa, se mi timegas.

Lasu al mi la mondon rezigne ŝati.

nur ne permesu Vin mem de mi forlasi.

Ĉi tiu estas mia krio, ĝi restu la lasta!

Sed se mi male parolus poste, la erarema:
ne forjetu min, fortunante majeston vizaĝon,
ja el la profund' mi sendas al Vi mian kriadon.

Akos Horvath, Hungario

● HEROLDO DE ESPERANTO, la plej ofta Esperanto-gazeto, estas de 63 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo. 17 numeroj jare, kun ilustritaj raportoj el la tuta mondo, diversaj rubrikoj, anoncetoj, libera Tribuno de la legantoj, fotoj, fakaj suplementoj, ktp. Jara abono: egalvaloro de 16 us. dol. Mendu provnumeron ĉe la redakcio (calle de Juan Ramón Jiménez 28, 6^o A, Madrid 16, Hispanio).

IOM PRI "INTERNACIO KATOLIKA": KIAM I.K.U.E. RISKIS MALAPERON...

Lastatempe, en du malsamaj okazoj, mi havis la eblecon aŭskulti kaj legi la nomon « Internacio Katolika ». La unua fojo estis kiam la Esperanto-programo de Radio Vatikana citis fragmenton de letero instiganta al memorigo pri doktoro Metzger. La dua mencio de Internacio Katolika (kies mallongigo estas, laŭ oficiala aprobo, IK^a) troviĝas en la artikolo de Bernard Golden pri P. Dombrowski (EK n. 4-5/83).

Multaj jaroj pasis de tiu decida jaro 1920, kiam naskiĝis IK^a, kaj malmultaj, hodiaŭ, konas la tiutempajn okazintaĵojn. Valoras, do, elspezi kelkajn vortojn pri ĉi tiu paĝo de la IKUE-historio, paĝo kiu, kvankam malagraba, tamen rezultas esti interesoplena kaj utila, por kompreni klare kion ankoraŭ hodiaŭ IKUE celas, kaj por havi ekzemplon pri tio, kiel pli facile estas detruiri ol konstrui, kritiki ol konsili.

IKUE antaŭ kaj post la unua mondmilito.

La antaŭfaktoj datiĝas de 1913. En tiu jaro mortas la unua prezidanto de IKUE, la belga pastro Austin Richardson, kaj kiel lia posteulo estas elektita Pastro Patrick Parker el Irlando, kiu tamen akceptas la taskon nur por unujara periodo. Sed:

« . . . per la eksplodo de la terura mondmilito dum Aŭgusto 1914 estis perforte ĉesigita ĉia paca internacia agado. Ankaŭ Espero Katolika ĉesis esti eldonata, atendente la finon de la milito » (EK n. 3 (110) Marto 1920).



P. Patrick Parker
(desegno F. Sarandrea)

Dum la milita periodo IKUE prekaŭ mortas. Estos nur en 1920, ke P. Parker skribos al la IKUE-anoj:

« Ne tute ankoraŭ malaperis la fumo de la paŭlegoj de la batalkampoj. Oni povas rigardi la konfuzon kiu ĉie sin etendas tra la naciaro. Kaj do ni vidas sen surprizo nian belan movadon IKUE jam infektita de ĉi tia tutmonda blindiga malsano. Por ke nia afero pli efike, pli frue sin eligu el la nuntempa konfuzema malsana stato, la unua kaj ĉefa paŝo farinda de ni estas kompreneble la Internacia Katolika Kongreso » (EK n. 4 (111) Aprilo 1920).

Ĉi tiu kongreso okazos la tagojn 15-an kaj 16-an de aŭgusto 1920, tuj post la 12-a Universala Kongre-

so de UEA, eĉ en la sama urbo: Den Haag (Nederlando).

En ĝi ne partoprenas P. Parker — la maltrankviliga stato de lia patrujo kaj aliaj kialoj ne permesas al la irlanda paroĥestro forveturi el lia lando, — kaj kiel anstataŭanton, por gvidi la kongresajn laborkunvenojn, Parker elektas la vicprezidanton de IKUE, nome Pastron Lamberto Poell el Nederlando.

« Nia Sesa » (laŭ la tiutempa nomigo de la IKUE-kongresoj, difinitaj « niaj » por ilin distingigi de la UEA-kongresoj) celas fari kion en la pasinteco oni ne sukcesis atingi: okazigi la elektojn kaj aliajn aranĝojn farotajn laŭ la aprobita nova statuto de IKUE.

Efektive ekde 1910 ĉiuj klopodoj por doni al IKUE regulan kaj ĝustan leĝaron fiaskis, kaj okaze de la deka datreveno de la fondo, oni esperas finfine solvi la problemon. Bedaŭrinde, ĵus kiam ŝajnas ke IKUE ekenvoĵiĝas al stabila reglamentado, Espero Katolika n. 115 anoncas: « La 6-a internacia Katolika Esperantista Kongreso en Deg Haag rezultigis la fondon de Internacio Katolika ». IKUE ne plu aperas, kaj eĉ Espero Katolika iĝas « Oficiala organo de IK^a ».

La Kongreso en Den Haag: naskiĝo de IK^a

Kio estis okazinta?

Ne estas facile respondi al la fatala demando; ĉar tiom da personoj, faktoj, informoj, kelkfoje kontraŭdiraj, kirlas la akvojn, ne montrante klaran bildon de la eventoj.

Multe simpligante la aferoj, oni povas diri, ke ekestis du novaj partioj: la IKanoj kaj la esperantistoj

fidelaj je la idealo de P. Richardson, per kiu en 1910 naskiĝis IKUE. La unuaj strebis por krei novan internacion, kun la intenco:

« ... efikigi kaj realigi la idealon de l' Katolika Internacio kontraŭ la atakoj de l' Komunista, Framasona, teozofiaj internacioj » (Wouter Lutkie, vicprezidanto de « Nia Sesa »).

Ĉefa gvidanto kaj unua parolinto pri la grandioza projekto estis doktoro M. J. Metzger direktoro de « Blanca Kruco », ia organizo, kiu, laŭ liaj vortoj:

« ... ne estas politika afero, sed pure katolika, kiu intencas efektiviĝi kunlaboradon de la katolikoj en la tuta mondo sur spirita, religia kaj kultura kampo, kaj starigi centran oficejon kun memstaraj organizaĵoj en ĉiuj landoj ».

Metzger ne estas sola: ankaŭ aliaj IKUE-anoj pledas por la fondo de IK^a, inter ili P. Poell mem, Paŝtro Meŝtan kaj Sinjoro Heilker — ĉi lastaj estontaj IKUE-prezidantoj.



S-ro Heilker
(desegnita F. Sarandrea)

La etoso de « Nia Sesa » estis kulturita per antaŭaj konvinkigaj artikoloj sur E.K., kiel la « Manifesto de Blanka Kruco », publikigita sub la titolo: « Sur la vojo al katolika ligo de la popoloj ».

Unuamomente ŝajnis, ke ĉi tiu IK^a devis naskiĝi kiel organizo *originala kaj tutnova*. Nur la 13-an de aŭgusto 1920 la vero evidentiĝas: tute arbitre oni malektas la malnovan estraron, forgesas la Statutprojekton por IKUE antaŭaprobita de la membroj, kaj sen peti publikan opinion, malmultegaj personoj decidas ligi la Esperantistan Katolikan Unuiĝon al « Blanka Kruco ».

Al severaj kritikoj de la itala Alessio kaj de la germana Hotzelt oni respondas ke:

« . . . oni ne intencas mortigi ion kio ĝis nun bone funkciis, sed oni volas pluon. La unuiĝo de IKUE kaj Blanka Kruco estas necesa por efektivigi de Internacio Katolika ».

La izolitaj protestoj povas esti reprezentataj de ĉi tiu eldiro de la germana Hotzelt, raportita en la oficialaj protokoloj de la kongreso:

« . . . la nova Statuto tute lin surprizas. Li urĝe aversas "eĉ levante la manojn" — laŭ lia diro — unuiĝi IKUE kun "Kruco Blanka". Li ne pre estas kontraŭ tiu fando, ĉar laŭ lia opinio ĝi grave malutilus al nia bona afero »

kaj, iom pli poste:

« Li petas rimarkon en la protokolo, ke li estas tute kontraŭ la unuiĝo ».

Malgraŭ la noblaj intervenoj de la ĉeestantaj IKUE-anoj, fidelaj je la originala idealo, tamen IK^a fondiĝas.

Vivo de la nova Internacio

La unio, kreita de la 16-a IKUE-kongreso, startas tre diligente, kun propra Statuto kaj estraro. Laŭ la unua:

« . . . la celo de IK^a estas la agema kunlaborado de la katolikoj ĉiulandaj, por efektivigi la veran praktikan Kristanismon en la persona, familia, sociala, ŝtata kaj interŝtata vivo laŭ la principoj de la katolika Eklezio ».

« La lingvo de IK^a por la internaciaj rilatoj estas Esperanto ».

La estraro de Internacio Katolika konsistas el: « la konsilantaro kaj el la direktoraro ». La konsilantaro estas aro da delegitoj el maksimume po 5 lande. En la unua listo de la delegitaro, legeblas nomoj, kiaj: S-ro Dombrovski, Alessio, Hotzelt kaj... Parker ». La lasta draste neos estis doninta aprobon por propra enlistigo. Ne klara la sinteno de la du « opoziciantoj »: Hotzelt eĉ estos unu el la re-konstruantoj de IKUE post la aventuro de IK^a. Unua el tri prezidantoj de IK^a fariĝas P. Poell, dum doktoro Metzger iĝas ĉef-sekretario kaj direktoro de la IK-agada centro en Graz.

Dum siaj unuaj monatoj da vivo, IK^a konas momentojn de etaj sukcesoj, kiaj aproboj kaj kuraĝigoj, interalie de la kardinaloj Gasparri kaj Pacelli (estonta Pio la 12-a) kaj de Papo Benedikto la 15-a. Sed al tiuj ĉi mesaĝoj de subteno, ne respondas oficiala aprobo de la loka episkoparo, nome de tiu aŭstria, kie IK^a ĉefe agadis.

Internacio Katolika iĝis ĉiam pli kaj pli forĝejo de projektoj nur mal-

facile realigeblaj, konsistantaj plejparte el proponoj de Metzger. Tia estis la projekto krei eĉ unu « ekonomian internacion », ian « importkaj eksport-societon », por:

« . . . rompi la ringon, en ekonomiaj rilatoj, de la kapitalistoj, precipe judoj, framasonoj » (EK aparta eldono jan 1921).

Alia troigo estis nomi: « Univerŝala Kongreso por la tutmonda katolikaro », la 7-an kongreson de IKUE aŭ, pliĝuste, la Unuan Kongreson de IK^a, okazintan en Graz.

Krome, IK^a enhavis en si plurajn aliajn organizojn, ĉia « MOKA » (tiel!) aŭ Mondjunularo Katolika, kies prezidanto estis, ankoraŭ li, Metzger.

Dum la periodo 1920-21, EK « oficiala organo de IK^a » nenion faras, ĉkrom raporti pri ĉi tiuj « farotaĵoj » kaj « ideoj ». Nenia signo de opozicio videblas, ankaŭ ĉar, kiel pli poste evidentiĝos:

« La katolikaj esperantistoj faris ĉion eblan por ke la muroj kaŝu la privatajn aferojn ». Eĉ s-ro Schroeder, kiu kiel fidela IKUE-ano malaprobis la starigon de IK^a, konstante rifuzis presigi en EK artikolojn kontraŭbatalantajn IK-an: nobla ago de tiu honesta kaj laborema samideano, kiu tamen nur rikoltis la sendankon de IK^a = Dro Metzger ».

La « liberigo » de IKUE

Vera ribelo okazis nur aŭguste de 1921. En oficiala komuniko, la estraranoj de la « Akcia Societo », kiu ĝis « Nia Sesa » eldonis ĉaj daŭre estis posedanta Esperon Katolikan, oficiale, deklaras sian intencon ĉesigi ĉian raporton ĉkun IK^a, kaj la volon:

« . . . daŭrigi la Internacian Katolikan Esperanto-Movadon, honorante ĝiajn pionirojn: P.ron Peltier, fondinton de Espero Katolika; P.ron Richardson, fondinton de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE) kaj S-ron Colas, fondinton de la katolikaj Esperantistaj Kongresoj; daŭrigi la eldonon de la Esperantogazeto « Espero Katolika », la oficiala organo de IKUE ».

Krome oni emfazas la neceson de memstareco de IKUE kun ĝia klara celo: disvastigo kaj oficialigo de Esperanto en katolikaj rondoj.

Inter la subskribintoj de la grava dokumento, estas doktoro Smulders, kiu fiere kaj inteligente defendos poste la volon de la katolikaj esperantistoj.

Fakte Smulders unue klopodis restarigi la pacon kaj la konkordon « inter ni », tio estas dum la kongreso en Graz. Post malsukceso, li restarigis IKUE-n kun la eksaj estraranoj de artaŭ « Nia Sesa », samtempe skribante al Ekleziaj instancoj por peti aprobon kaj doni klarigojn pri tio kio okazis. Li ankaŭ startigis kampanjon por la re-fondo, aŭ, kiel li diris, por resti fidelaj je la originoj: « por simpla daŭrigo de la agado de IKUE, tiu de Pastro Richardson, kaj por gajni la tempon perditan ».

La resto estas historio de kvereloj, insultoj inter IKUE kaj Internacio Katolika, kiu memstare daŭrigas sian ekziston pli kaj pli perdante sian Esperantisman karakteron, per adopto de aliaj lingvoj.

Kulmino de ĉi tiuj reciprokaj atakoj estas la 98-paĝa Espero Katolika n. 124/Nov. 1921, plena de adjekti-

voj pri Metzger, difinita, interalie: « imperiestrego, riproĉinda, nefindinda, senkarakterulo... », eldiroj kiuj, laŭ nia opinio, kontribuis al malplibeligo de la « resaniĝinta IKUE ».

Doktoro Metzger, verŝajne kritikbla pro sia konduto, sed senartifika idealisto ĝis naiveco, mortos, jam freneziĝinta, en koncentrejo de la naziisma reĝimo.

Carlo Sarandrea

PLENDOJ DE KRISTO

Vi nomas min MAJSTRO, tamen ne pridemandas min.

Vi nomas min LUMO kaj ne vidas min.

Vi nomas min VERO kaj ne kredas al mi.

Vi nomas min VOJO kaj ne iras laŭ mi.

Vi diras, ke mi estas SAGA,

kaj vi ne predikas min.

Vi diras, ke mi estas BELA,

kaj vi ne amas min.

Vi diras, ke mi estas RIĈA, kaj vi ne petas de mi.

Vi diras, ke mi estas ETERNA,

kaj vi ne serĉas min.

Vi diras, ke mi estas MIZERIKORDA,

kaj vi ne fidas al mi.

Vi diras, ke mi estas NOBLA,

kaj vi ne servas min.

Vi diras, ke mi estas JUSTA,

kaj vi ne timas min.

Vi diras, ke mi estas AMO,

kaj vi retiriĝas de mi.

Vi diras, ke mi estas ĈIOPOVA,

kaj vi ĉion sole faras sen mi.

Vi konfesas, ke mi estas la FILO DE DIO,

kaj elkore vi ne preĝas min.

Se vi konfesas tion, kion vi diras,

KIAL VI NE SEKVAS MIN?

KION VI VOLAS SEN MI?

(En la libreto de Episk. Jozefo Cserhádi « ĈIUTAGA PANO », Budapeŝto 1974, p. 92. El la hungara tradukis Tibor Jubász).

"UNUE PACIĜU KUN VIA FRATO" (MT 5, 24)

Mi estas en la centra oficejo de granda turism-agentejo, plenplena de homoj: ĉirkaŭ la fino de printempo la lastaj malfruantoj rapidas mendi la somerajn vojaĝojn. Ankaŭ mi, envice antaŭ tablo de oficistoj, atendas mian vicon: mi devas fiksi ŝipveturon por amika familio, kiu, loĝante en vilaĝo, pet-komisiis min pri tio. Mi alvenas antaŭ la oficisto: mezaĝa viro, tre celtrafa, rapidgesta, mallong-parola. Al mia peto li respondas: « Vane telefoni al la ŝip-kompanio: ĝi ne respondus: jam tro malfrue ». Mi insistas, petante, ke li almenaŭ provu. Neo eĉ pli akra: la viro estas ĝenita, ne volas perdi tempon; kaj dume la vico premas. Pli kaj pli akra interŝanĝo de vortoj inter mi kaj li; se ni ne alvenas al vulgaraĵoj aŭ ofendoj, estas nur pro edukiteco, sed la tono estas la plej incitita, el ambaŭ flankoj: mi havas la impreson, ke pro mallaboremo aŭ pro spitemo li ne volas fari tion kio estas lia devo; li, eble, ekvidas tion kaj sin taksas ofendita: mi ankoraŭ tutklare memoras liajn okulojn min fikserigardi fulmante, kvazaŭ ili volus min cindrigi. Por ne ekscesi, mi abrupte lasas kaj iras for; kelkiu el la vico sin turnas kaj min sekvas per la rigardo. Dum mi eliras, min atingas la voĉo de « mia viro », kiu diras al la kolegoj: « Kia pretendo! Ŝi volus, ke... ».

Kun la animo koler-brula, kaj kun sento de naŭzo kaj honto, pro tio ke mi publike cedis al kverelo, mi foriras rapid-paŝe, celante, kiel mi antaŭe decidis, al la proksima preĝejo, por la Meso. Mi estas ankoraŭ tute konfuzita. Subite, rapida penso trairas mian kapon: « Kaj nun, kiel mi povas ricevi la Komunion? ». Mi povas, klopode, demeti de mi mem ĉian ofendiĝan senton; mi povas preĝi por li; mi eĉ povas pek-konfesi... Sed li, mia viro, kion li scias pri tio? Li restas « la frato, kiu havas ion kontraŭ mi » (kp Mt 5, 23). Mi estas jam proksima al la preĝejo, sed mi ne aŭdacas pluiiri. Subite mi faras retro-turnon kaj revenas sur miaj spuroj. Mi ne scias klare, kion mi faros aŭ diros, sed mi devas depreni tiun ĉi pezon de la koro. Mi reeniras en la agentejon: ĉeestas malplimulte da homoj, la vico estas mallonga, kaj preskaŭ tuj mi troviĝas antaŭ mia viro, kiu gap-rigardas mian vizaĝon per okuloj mirigitaj kaj esploremaĵ. Unuspire mi diras: « Ĵus ni preskaŭ kverelis; sed tio ne valoris; pardonu min ». Kaj mi etendas al li la manon. Li ĝin premas, kun rigardo kiu ŝajnas de konsolo, kaj li diras siavice: « Mi telefonis, ĉu vi scias? Kaj ili diris... ».

Do, ankaŭ li... Dio estu laŭdata! Mi eliras kure, kun senpeza koro, kaj ekrapidas al la preĝejo.

O. M.

● LA NOVA TESTAMENTO, nova eldono (represo), bindita en bela verda kovrilo. Aĉetu ĝin ĉe IKUE. Prezo 6.000 italaj liroj inkluzive sendokostojn.

LIBROSERVO

1) « <i>Biblio</i> », plaste bindita (lastaj ekzempleroj)	20.000
2) T. à Kempis, « <i>La imitado de Kristo</i> », bindita	5.000
3) G. Gàrdony, « <i>La sklavo de Dio</i> »	6.000
4) Paŭlo 6-a, « <i>La vojoj de la Eklezio</i> »	3.500
5) « <i>Katolika preĝaro</i> »	1.500
6) J. Korytkowski, « <i>Ekumenismo kaj internacilingva problemo</i> »	7.000
7) J. Korytkowski, « <i>La Chiesa e il problema della lingua ausiliare internazionale</i> »	3.000
8) J. Korytkowski, « <i>La Iglesia y el problema de la lengua auxiliar internacional</i> »	7.000
9) N. Van Doornik, « <i>Francisko el Asizo, profeto por nia tempo</i> »	8.000
10) S. Riabinin, « <i>S. Francisko — poeziaĵoj</i> »	6.000
11) W. Miziołek, « <i>Enkonduko al ekumenaj problemoj</i> »	3.500
12) R. Follerau, « <i>La libro de la amo</i> »	4.000
13) J. Dobraczński, « <i>La dia avarulo (P. Maksimiliano Kolbe)</i> »	7.000
14) « <i>Decimala Katalogo de la planlingva literaturo ĉe la Katolika Universitato de Lublino, Pollando</i> »	10.000
15) « <i>Katalogo de Esperanto-periodaĵoj ĉe Universitata Biblioteko de Katolika Universitato en Lublin</i> »	3.000
16) « <i>Preĝo de S. Francisko</i> », sur luksa papero, kolora	1.000
17) Koloraj bildkartoj « <i>Himno de la kreitaro</i> » (10 diversaj!)	2.000
18) Koloraj bildkartoj « <i>S. Francisko</i> » (2 diversaj)	600
19) Bildkartoj « <i>Radio Vatikana</i> » kun skribaĵoj en Esperanto (4 diversaj)	600
20) Koloraj bildkartoj « <i>Nia Sinjorino de la Espero</i> » (10 ekz.)	2.000
21) Nebinditaj jar kolektoj de « <i>Espero Katolika</i> »:	
jaroj 1972-1976 po	5.000
jaroj 1978-1982 po	14.000
22) « <i>La Nova Testamento</i> », bindita	6.000
23) « <i>En la lumo de la Biblio</i> »	4.000
24) Kristana Esperantista Jarlibro 1983	5.000

Ĉiuj prezoj en italaj liroj. *La sendokostoj estas jam enkalkulitaj.* Oni pagas post ricevo de la menditaj aĵoj. Pagojn oni faru, se eble, per la poŝta konto 23290000, laŭ la adreso « Centra Oficejo de IKUE, via Berni 9, I-00185 Roma, Italio », aŭ per poŝta mandato (*se oni pagas per banko, oni aldonu 5.000 lirojn por ekstraj kostoj, kaj oni adresu la pagon al « Antonio De Salvo, ĉe IKUE, via Berni 9, I-00185 Roma, Italio »*). Oni povas ankaŭ pagi al la landaj reprezentantoj de IKUE, inkluzive de tiuj en socialistaj landoj, en nacia mono.

Rabato 10% por aĉeto je almenaŭ 30.000 liroj aŭ 3 ekz. de la sama aĵo.

Rabato 20% por aĉeto je almenaŭ 50.000 liroj aŭ 5 ekz. de la sama aĵo.

